

Universitato Adam Mickiewicz (UAM) Poznan, Pollando

Januaro 2013

Mirejo Grosjean, Svislando

FAKO: ESPERANTO GRAMATIKO 2 Profesoro: I. Koutny

PRI VERBAJ SINTAGMOJ. Komparo eo, fr, de kaj jp

Enhavo

- 1. Konsisto de sintagmoj**
- 2. Longeco de sintagmoj**
- 3. Pri verboj : Vortoj, vortspecoj kaj sintagmoj**
- 4. Nombro da vortoj en la verbosintagmo**
- 5. Verboklasoj laŭ signifo**
- 6. Predikato kun siaj objektoj**
- 7. La verbo kiel lokomotivo**
- 8. Pri loko de verbaj sintagmoj**
- 9. Aparta kazo : la loko de verbosintagmo en la germana linvo.**
- 10. Migrado de la objektoj kun la predikato**
- 11. Konkludo**
- 12. Bibliografio**

Konsisto de sintagmoj

Sintagmo povas esti sola pronomo « mi » aŭ povas esti substantivo kun multaj aldonaj adjektivoj kaj substantivoj.... do epitetoj... « La blua koloro de la nova veturilo de la filino de la fabrikdirektoro ne plaĉas al mi ». Tiu sintagmo « subjekto » enhavas 13 vortojn kaj ĝia kerna vorto aŭ ĉefvorto estas « koloro », de kiu la aliaj dependas. Tiu priskribo konvenas por subjekto, objekto kaj komplementoj, adjektoj.

Longeco de sintagmoj

Sintagmoj konsistas el unu aŭ pluraj vortoj. Ili eĉ povas atingi tekstlinion aŭ paragrafon. Ilia longeco ne ludas rolon. Sintagmoj estas « frazelementoj », aliloke mi legis la esprimon « frazmembroj », (fr) « membres de phrase », (de) « Satzglied ». Ili havas funkcion en la frazo, precizan funkcion. (fr) « Fonction ». Pro tio ili gluiĝas kaj ne eblas meti en ilin alian vorton, parton, elementon, kiu ne apartenas al la sintagmo mem. Ekzemple la vorteto « ne » aperas inter la sintagmoj kaj ne povas aperi en unu el ili ; ne eblas diri aŭ skribi : « en la ne ĝardeno » ĉar « en la ĝardeno » estas sintagmo, temas pri tuto. Eblas diri : « Mi ne iras en la ĝardenon » aŭ « Ne mi iras en la ĝardenon » aŭ « en la ĝardenon iras mi ne »... Do estas iu

forto, kiu tenas la erojn de la sintagmo kune kaj ne diserigeble. Se tio ne estus tia, la transdono de signifo ne plu eblus.

Pri verboj : Vortoj, vortspecoj kaj sintagmoj

Verbo estas vorto, fakvorto, nommaniero, kiu rilatas al la vortspeco. Predikato estas vorto por la funkcio, la rolo, la sintagmo. Tion mi malkovris studante la germanan linvon. En la franca ni uzas nur la vorton « verbe » kaj por vortospeco kaj por vortofunkcio. Estas malagrabla, ĉar por ĉiuj aliaj sintagmoj estas du vortoj kaj por la verbo estas nur unu. Tio kaŭzas multajn malfacilaĵojn kaj en la lernado kaj en la instruado. En tiel nomata (fr) « analyse grammaticale » ni devas esplori pri vortspecoj ; ni trovas substantivojn, adjektivojn, adverbojn... kaj verbojn. En tiel nomata « analyse logique » ni trovas sintagmojn ; ni trovas subjekton, objektojn.... kaj verbojn ! Ne klara afero !

Nombro da vortoj en la verbosintagmo

La verba sintagmo, por paroli pri verba vort-aro, povas esti el unu vorto aŭ el pluraj. Fr : « J'ai été opérée il y a un an » ; en tiu frazo la verbsintagmo konsistas el 3 vortoj. De : « Ich bin operiert worden » same tie ni vidas verban sintagmon el 3 vortoj. Eo : « Mi estis operaciigita » entenas 2 vortojn, ĉar pasinteco el 2 vortoj ne necesas ; do « ai été » esprimiĝas per « estis ». « Se mi estus estinta operaciigita en tiu tago, mi estus maltrafinta tiun koncerton... » Tie estas verbsintagmo el 3 vortoj. Tamen oni povas reveni al 2 skribante « Se mi estintus operaciigita.... ». Tie oni povas adicii la ideon de antaŭeco –int- kaj la ideon de ne realeco –us al la baza ideo, radiko « esti ». fr « Si j'avais su,... » povas esti en eo « Se mi sciintus.... » ; ĉi tie temas pri 3 ideoj, kiuj esprimiĝas en la fr per du vortoj kaj en eo per unu vorto. La tri ideoj jenas : scii, koni tiun fakton – antaŭeco – ne realeco. En la franca la duvorta verboformo esprimas la tri ideojn, la uzo de « plus-que-parfait » post « si » indikas kaj la antaŭecon kaj la ne realecon.

Tiu eblo de Esperanto estas mirinda kaj mi ne konas tian sistemon en aliaj lingvoj.

Verboklasoj, aŭ verbogrupoj laŭ signifo

Estas diversaj verboj laŭ la signifo.

Stato, statoŝanĝiĝo, ago.

Por esprimi staton :

Mi estas, mi ŝajnas, mi restas, ... mi lacas, ...

La sintagmo, kiu sekvas tiajn verbojn nomiĝas predikativo. Ĝi havas la finaĵon –o por substantivoj kaj –a por adjektivoj.

Ekzemplo : mi estis instruisto. Mi estas 66jara. Mi ŝajnas esti 40jara (!!).

Por esprimi statoŝanĝon :

Mi maljuniĝas, mi paliĝas, mi laciĝas, ...

Por esprimi agon :

Mi verkas libron. Salon mi evitas.

La sintagmo, kiu sekvas la agoverbon, estas objekto. Ĝi ricevas la finaĵon –on, -an, aŭ objekton kun prepozicio.

Predikato kun siaj objektoj

Estas diversaj verboj laŭ la frazkonstruo

Nulligaj, unuligaj, duliga, triligaj.

Ekzemploj de nulligaj verboj :

Pluvas. Sunas. Frostas. ...

Ekzemploj de unuligaj verboj.

Povas esti. Mi ploris. Li komprenis.

Ekzemploj de duligaj verboj.

Mi manĝas panon. Tiun filmon mi ne vidis. Mi vin amas.

Ekzemploj de triligaj verboj.

Li donis vangofrapon al tiu fripono. Al mia patro mi ne diros tiun sekreton.

La verbo povas esti unuliga en unu frazo kaj duliga en alia frazo.

Unuliga uzo de legi : Kion vi faras ? Mi legas !

Duliga uzo de legi : La infano jam legas tutan libron.

La verbo kiel lokomotivo

La verbo estas la lokomotivo de la frazo. Ĝi povas situi en diversaj lokoj de la frazo, kiel la lokomotivo ne nepre staras komence de la trajno, ĝi povas esti en la mezo aŭ en la fino, ne gravas. Foje ĝi tiras, foje ĝi puŝas, ĉiam la energio venas el ĝi kaj tiu energio antaŭenirigas la trajnon. Tute same okazas pri la predikato.

Pri loko de verbaj sintagmoj

En la franca tute baze estas subjekto kaj poste verbo ; tamen povas esti enkonduke iaj indikoj pri tempo, loko, k.s. Poste sekvas komo. Poste sekvas subjekto kaj verbo. Poste povas veni pliaj sintagmoj kiel objektoj kaj/aŭ adjektoj.

Oni povas konstati, ke la subjekto aŭdiĝas unue kaj tuj poste venas la predikato.

Jen ekzemploj sen komencaj adjektoj :

Il pleut.

Il pleut souvent à Londres.

Le garçon a montré ses devoirs à son père au moment où celui-ci est rentré de son travail.

Il a été question de réviser cet article de loi lors de la dernière séance du Parlement.

Jen ekzemploj kun komenca(j) adjekto(j) :

Hier(,) dans la rue, j'ai assisté à un accident lors de ma promenade quotidienne.

Pour avoir enfin la paix, le père a donné des biscuits aux enfants.

Comme le ciel était très gris, le vieillard a emporté son parapluie pour aller faire ses achats

Plie oni devas observi, ke la objekto (j), kiam ĝi/ili aperas kiel pronomo, rajtas stari inter la

subjekto kaj la predikato. Du pronomoj povas stari en tiu loko, ne tri. Povas esti unu

pronomo ne subjekto aŭ du pronomoj ne subjekto. Nur tiaj pronomoj, personaj pronomoj,

rajtas stari en tiu preciza loko inter la subjekto kaj la predikato.

Ekzemple :

Il le lui a dit tout de suite.

Je le veux dans ma chambre immédiatement.

Je l'y mets sans problème.

Il lui en donne.

La sinsekvo de tiuj pronomoj inter la subjekto kaj la predikato obeas al tre precizaj reguloj.

En la angla aperas tie adverboj ; tio ne eblas en la franca. Tio ne eblas en la germana. Tian

vortordon mi ofte uzas en Esperanto.

Ekzemple :

Mi ofte vojaĝadas tra la mondo.

Li ĉiam laŭdas sin mem (neniu aludo al konata persono)

Ni kompreneble povus iri al kinejo kune.

Oni povas konstati, ke forte tenas kune la subjekto kaj la predikato ie en la frazo. Pro tio oni povas kompari la francan frazon kun monto. Flanke de la monto staras diversaj montetoj, detaloj, flankaj informoj, kromaj aldonoj. Se iu duone dormas, se li aŭ ŝi ne bone atentis, li aŭ ŝi sukcesos kapti la ĉefajn informojn de la frazo, de la parolado, se li aŭ ŝi kaptas la kernon el subjekto plus predikato.

Aparta kazo : la loko de verbosintagmo en la germana linvo.

La afero estas tute alia en la germana lingvo. Tie la predikato tre ofte konsistas el du partoj.

La konjugaciigita verbo devas stari en la dua loko de la frazo. Do iu sintagmo staru en la unua loko kaj la predikato en la dua loko. Ni ne parolas ĉi tie pri ordonaj aŭ demandaj frazoj.

La dua parto de la predikato fuĝas al frazofino. Tiu dua parto estas

1. Infinitivo aŭ
2. Partikulo aŭ
3. Isa participo

Jen ekzemploj :

Morgen muss ich unbedingt für meinen Vortrag noch drei Seiten schreiben.

Schreiben estas infinitivo.

Dieser Reisende steigt um 9 Uhr in Olten um.

Um estas partikulo

Heute morgen bin ich sehr langsam und mühsam aus meinem Bett ausgestiegen.

Ausgestiegen estas isa participo.

El tiuj frazoj oni vidas, ke la predikato ne estas centra monto kiel en la franca, sed pli similas al akordeno, kun du firmaj partoj en la manoj de la ludanto. Tiu ludanto povas tiri, tiri, metante pliajn indikojn meze de la frazo, aldonante informojn.... pli pli pli..... kaj la du partoj de la predikato distanciĝas ĉiam pli. En la kazo de situacio 1. Kaj 3. la konjugaciigita verbo en la dua loko de la frazo ne alportas la signifon de la verbo. La signifo de la verbo aŭdiĝas nur, kiam venas la fina vorto. En la situacio 2. Ofte okazas same : la signifo aperas, kiam aperas la partikulo. Ĉar ekzistas la verboj einsteigen, aussteigen, umsteigen, aufsteigen, heruntersteigen, la apero de la partikulo donas la kompletan signifon. Kaj tio okazas tute fine de la frazo.

Plie en subordigitaj frazoj la konjugaciigita verbo devas stari ĉe la fino. Do plian fojon la aŭskultanto ekscias pri la signifo nur aŭskultante la lastan vorton.

Er hat gesagt, dass er die sehr zweifelhaften Worte dieses endlich gefangenen Banditen ganz und gar nicht glaubt.

Tiu konstato havas teruran sekvon en la laboro de interpretistoj. Kaze de samtempa interpretado la interpretisto devas atendi la lastan vorton de la frazo por komenci sian paroladon. Do li ŝi devas ĉion diri tre rapide kaj samtempe aŭskulti la parolanton, kiu denove

diros tian frazon.... Oni povas kompreni, ke samtempa tradukado el la germana linvo estas tre streĉiga por la interpretistoj. En la situacio de Bruselo, kie la paroladoj estas tradukataj al 23 lingvoj, sekve de tiu eco de la germana lingvo oni kutimas fari relajson. Tio estas, ke oni evitas traduki el la germana al la pola, el la germana al la hispana, el la germana al la portugala... La interpretistoj inter si aranĝas la aferon jene : unu el ili tradukas el la germana ni diru al la franca, kaj ĉiuj aliaj sekvas la paroladon en tiu tradukado en la franca kaj el ĝi tradukas al la pola, hispana, portugala... do nur unu interpretisto ŝvitas tradukante el la germana. Sed oni devas konsideri la kvaliton de la interpretado. Kutime oni taksas, ke 80% de la signifo aperas en la traduko. Do kaze de relajso, la 80% de 80% estas 64%. Do la perdo estas granda.

Migrado de la objektoj kun la predikato

Tre interese estas konsideri la predikaton kaj ĝiajn komplementojn, objektojn, kiel tuton. Tio estas la kerno de tiu ĉi esploro. Mi volas iom esplori pri la loko de tiu verba sintagmo.

Mi vere sentis la efikon de tia analizo, ekzisto de verba sintagmo, kiam mi studis kaj uzis la germanan, ĉar tie aperas interesa fenomeno. La objekto migras al la frazfino kune kun la fina verba parto !

Jen ekzemploj :

Ich esse einen Apfel.

Heute esse ich einen Apfel während der Pause.

Gestern habe ich während der Pause einen Apfel gegessen.

Denove, kun partikulo :

Ich fange meine Arbeit an.

Heute fange ich meine Arbeit an.

Heute fange ich meine Arbeit sofort an.

Aŭ : Heute fange ich sofort meine Arbeit an.

Denove, kun infinitivo :

Ich muss diese Dose öffnen.

Diese Dose kann ich nicht öffnen.

Ich kann diese Dose nicht öffnen.

Ich kann diese Dose leider nicht öffnen.

(Nicht devas stari post la objektoj kaj antaŭ la adjektoj, kiam ili estas enkondukitaj de prepozicioj.)

Ich versuche, heute noch im Geschäft diese Dose zu öffnen.

Jen mia konstato :

Kiam aperas verbo en la duvorta pasinta formo, tiam la objekto migras al antaŭlasta loko kune kun la participo. Ŝajnas, ke la helpverbo « haben » oder « sein » ne alportas signifoplenan kontribuon kaj pro tio la verba sintagmo, tio estas objekto kaj predikado sub formo de isa participo, migras al la fino.

La diserigebla verbo anfangen prezentas du partojn, kie ambaŭ partoj portas parton de la signifo. Tie la migrado ne observeblas.

La uzo de infinitivo ne nepre enkondukas tian migradon, verŝajne ĉar kaj la helpverbo kaj la signifa verbo kune kaj komune portas signifon en la frazo.

En la japana lingvo, kie mi tre modeste kompetentas, ekzistas partiluloj, kiuj indikas la funkcion. La baza sintagmovico estas subjekto – objekto – predikato. La subjekto aperas kun partikulo –wa aŭ –ga, kiu aperas post iu substantivo aŭ pronomo. Poste sekvas la objekto

sekvata de la partikulo –wo. Poste aperas la predikato fine. Plie tre ofte oni ne diras, rediras la subjekton. Do tre ofte aŭdiĝas « pomon manĝas. » aŭ « libron legas. » ĉar jam antaŭe venis « watashi wa » = « mi » tutkomence de la parolado, do oni ne ripetas « mi faris... mi iris... mi diris.... mi... mi...» venas nur la ceteraj frazelementoj, tiuj, kiuj estas novaj. Mi kutimas instrui al japanoj ripeti « mi » en ĉiuj frazoj, kie ĝi estas subkomprenita en la japana lingvo. Ni parolu klare, ĉar ni estas en internacia medio.

Jen ekzemploj :

Watashiwa nihongowo tsukoshi hanishimas. (Mi parolas iomete la japanan) (watashi = mi ; nihon = Japanio ; nihongo = la japana lingvo ; tsukoshi = iomete ; hanashimasu = parolas)
Watashiwa suisujin desu. (Mi estas svizo) (watashi = mi ; suisu = Svislando ; jin = homo ; desu = estas)

Watashi no kotoba furansugo desu . (mia lingvo estas la franca) (watashi = mi ; kotoba = lingvo ; no = indiko por genitivo, komplemento de substantivo ; furansu = Francio ; furansugo = la franca lingvo ; desu = estas) (la lingvo de mi ; pli laŭvorta traduko : mi de lingvo)

En Esperanto oni kutimas diri, ke la vortovico estas libera. Tamen oni devus diri « sintagmovico » ĉar kiel ni vidis komence, sintagmo havas firman konstruon. Jes ja la sintagmoj povas sekvi unu la alian pli aŭ malpli libere.

Ekzemple :

Mi dankas vin.

Mi vin dankas.

Dankas mi al vi.

Vin mi dankas.

La du unuaj frazoj estas vere samsignifaj kaj plie ili montras la kutiman dirmanieron. La tria frazo povus aperi en iu poezio, kie la aŭtoro esploras pri esprimriĉa maniero. La kvara ekzemplo montras insiston pri la frazelemento « vin », do tiu frazo ne egalas al la unua aŭ la dua. Temas pri emfazita frazo.

Pri la verbosintagmo jen kelkaj ekzemploj :

Hieraŭ li donis manĝaĵon al la hundo.

Hieraŭ li forĝesis doni manĝaĵon al la hundo, ĉar la hundo promenis sola tra la urbo.

Oni observas saman konstruon kaj fenomenon kiel en la franca lingvo.

Ne belas skribi :

Manĝaĵon al la hundo li forĝesis doni.

Doni al la hundo manĝaĵon li forĝesis.

Li forĝesis al la hundo doni manĝaĵon.

Tamen se tiaj frazoj aperus en ekzameno, mi akceptus ilin, ĉar la verkanto lezas neniun regulon en ili. Kiam estas lezo estas eraro. Kiam la frazo ne belas sed ĝustas, ni estas en stila kampo, kie la aŭtoro havas ian liberecon. En tiu momento tre ofte aperas influo de la gepatra linvo. Kompreneble en internacia medio kiel la esperantomovado la vasteco de tiu lingva panoramo estas giganta. Aldone mi agnosku, ke mi kaptas la influon de la japana lingvo en la diraĵo de japanoj en Esperanto, mi kaptas la influon de la germana en la diraĵo de germanoj, sed mi tute ne kapablas kapti ion ajn influon de la de mi ne konataj linvoj.

Aldone mi menciu, ke en la Lokaj Ekzamenaj Komisionoj okaze de sesio la tri membroj, kiuj devas esti el malsamaj landoj kaj kulturoj, ne same reagis al nekutimaj frazoj. Kelkaj membroj de Internacia Rajtigita Ekzamenantaro tendencas konsidere eraro la nekutimajn frazojn. Mi ne. Do foje ekas konflikto....

Konkludo

Miaj komentojn pri la migrado de la objekto kun la verba signifoplena parto al la fino en la germana mi ne elĉerpis el iuj lernolibroj. Tio fontas el longjaraj observoj kaj kompleta lingvobanado en germanlingva parto de Svislando. Mi povas aldone menci, ke tiu fenomeno same observeblas en la svisgermana dialekto. Estas gigantaj diferencoj inter la norma germana lingvo kaj la alemana, tamen ne en tiu aparta aspekto.

Laŭ mia observo la strukturo de Esperanto rilate al la loko de la verbosintagmo similas al tiu de la franca lingvo.

Bibliografio

Baur Arthur : « Schwyzertütsch » Gemsberg Verlag Winterthur, 1985

Baur Arthur : « Was ist eigentlich Schweizerdeutsch ? » Gemsberg Verlag Winterthur, 1983

Duden : « Die Grammatik » Band 4

Grévisse Maurice : « Précis de Grammaire française » Payot, Lausanne, 1965

Günther, Zellweger « Cours supérieur de langue allemande » Payot, Lausanne, 1962

Luscher, Schäpers « Grammaire de l'allemand d'aujourd'hui » Deutsch 2000, Hueber 1979

Uhlig, Chatelanat, Lang « Précis de grammaire allemande » Payot, Lausanne, 1978

Von Büren Jean-Thierry « Comprendre le schwyzertütsch » Editions du Doubs, 1990

Wennergren Bertilo : « Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko » ELNA, 2005

Yamasaki Seiko : « Enkonduko en la japanan » Fonto, 2000

Noto: Arthur Baur kaj Jean-Thierry von Büren estas esperantistoj.

